

Kimbanguismo, 3-a parto
Claude Gacond, 138-a radioprelego, 1966.05.25 & 1966.05.28

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum la du pasintaj elsendoj ni raportis pri la vizito de François Choffat, svisa medicina studanto, al la kimbangua eklezio, interesa nigrula kolektiveco en Kongolando.

A.- Ni vidis, ke tiu eklezio estas satjagraha centro kaj ke pro tio, ĝi devas esti salutata de Esperantujo.

Cl.- Tiu kolektiveco estas ankaŭ rimarkinda per sia fleksebla kaj varioplena organizado, per sia hierarkio, per sia ordo kaj disciplinemo, per la emo al responseco, kiu viglas en ĝiaj membroj je ĉiuj ŝtupoj sociaj.

A.- Teologie tiu eklezio ne multe diferencas de la protestantismo. Simono Kimbangu estis varbita de la baptista misio. El tio baptista influo.

Cl.- Kongolando estas sub katolika influo. El tie ankaŭ katolika influo rimarkeblas je iuj ritoj kaj je la alpreĝo al la persono de Simono Kimbangu. La persono de tiu afrika profeto ludas fakte gravan rolon en la pieco de tiu eklezio. En la predikoj kaj babiladoj lia nomo estas ofte prononcata kaj foje ligita laŭ maniero surpriziga kaj malprecize difinita al la tria persono de la Trinitato. Sendube lia persono ludas la rolon de peranto por alproksimiĝo al Kristo, iomete kiel okazas kun la virgulino kaj sanktuloj por la katolikoj. Simono Kimbangu estas fakte la Afrikano, kiu vere travivis, kiel Nigrulo, la kristan evangelion. Lia mortkondamno eĉ frape similas tiun de Jesuo en sia tragika abomeno.

A.- Per Simono Kimbangu kristanismo fariĝis por afrikanoj ilia propra afero kaj ne plu importado el Eŭropo. Alpreĝi la nomon de tiu profeto aŭ sanktulo, tio signifas fiere proklami, ke la krista evangelio estas ankaŭ realaŭto aŭtente afrika.

Cl.- Sed ne estas nia rolo okupiĝi pri teologio. Ni parolis pri tiuj detaloj nur por situigi tiun movadon. Ni nur ankoraŭ menciis, ke Simono Kimbangu ne verkis konfesiajn tekstojn, sur kiuj kredo povus ekfundamenti. El tio rezultas manko de teologia originaleco. Tio favoras agadon. Anstataŭ pruvi sian ekziston per skriboj kaj starigo de teologia sistemo, tiu eklezio ĝin pruvas per agado ĉefe socia.

A.- La pieco de tiuj agemaj eklezianoj estas tipe afrika, ege kolektiva, ritma. En la diservoj okazas dialogoj inter la predikanto kaj la predikatoj, dialogoj kie humuro ne forestas. La kantikoj, ege harmoniaj kaj ofte plendaj, sed foje ankaŭ ĝojplenaj, renkontigas du influojn. Oni rekonas protestantan muzikon kaj afrikajn melopeojn. La tuto estas originale harmoniigita kaj pensigas al la usonaj **negro-spirituals**. Samaj renkontoj produktis saman rezulton.

Cl.- La afrikan dancan heredadon rifuzas la kimbanguanoj. Ili asertas, ke tiuj dancoj vojas al erotismo. Ili luktas ankaŭ kontraŭ la ekstaza tremado, kiu en la bakonga religio estas alte taksata.

A.- La folkloro povriĝos, sed certe tiu emancipiĝo de erotikaj religiaj kutimoj favoros poste aliajn emancipiĝojn.

Cl.- La spirita estro de la kimbanguanoj nomiĝas Jozefo Diangienda. Li estas speco de afrika papo. Li estas organizemulo, agemulo pli ol teologo. El lia cerbo naskiĝas senĉese novaj entreprenoj. Pro tio la kimbangua agado tuŝas al plej diversaj fakoj, al sociaj problemoj, al medicino, al edukado, al agronomio, al la kultura vivo.

A.- La unua konstruo de nova paroĥo estas la starigo de lernejo, kaj ne de preĝejo. Multaj eŭropaj pedagogoj post trapaso en Kongolando eĉ kredas, ke la kimbanguismo estas

Kimbanguismo, 3-a parto
Claude Gacond, 138-a radioprelego, 1966.05.25 & 1966.05.28

edukismo. Ili ofte laŭdas la instruadon, kiu estas donata en tiuj lernejoj kaj parolas pri la originalaj instru-metodoj uzataj de iliaj afrikaj instruistoj.

Cl.- La starigo de tiuj lernejoj estas unu el la rezulto de la persekutado. Aŭdu ! Subite la kolonia registaro decidis, ke neniuj kimbangua infano rajtas frekventi la oficialajn lernejojn. Tio devis esti bato al tiu nigrula eklezio. Miloĵoj da infanoj devis plore forlasi sian lernejon. Sed kun ili centoj da instruistoj ankaŭ forlasis sian oficialan instruadon kaj rezignis pri sia salajro. La ŝtato ne sciis, ke inter ĝiaj instruistoj troviĝis tiom da kimbanguaj pedagogoj. Ĉie en la lando malfermiĝis lernejoj por la infanoj de la kimbanguanoj. Neniam financan helpon ili ricevis. Ili konkurencis la ŝtatajn kaj la misiajn lernejojn. Tiu manko de subvencioj donis al la kimbanguaj instruistoj grandan liberecon. Ili povis adapti sian instruadon al la indiĝenaj edukutimoj kaj al la regionaj necesoj. Pro tio la kimbangua instruado fariĝis tiom fruktodona.

A.- La persekutado ne ĉesis kun la nacia sendependiĝo. Senĉese kimbanguanoj estis senkaŭze arestataj. Por fini tiun neleĝan subpremadojn sescento da kuraĝaj kimbanguanoj skribis kaj subskribis peticion. Per tiu ago ili jam riskis sian vivon, kaj se ili estis ŝtataj oficistoj sian postenon. En tiu letero ili rakontis siajn suferojn kaj sin diris pretaj por la morto. Ili donis rendezuon, por ke oni ilin mortigu are la sescent kune.

Cl.- Tiu kuraĝo kaj manko de memvenĝo malfermis la okulojn de la tiamaj registarestroj. La kimbangua eklezio estis oficiale agnoskita kaj ĝia persekutado ĉesis.

A.- Hodiaŭ oni multe parolas pri helpo al la subevoluintaj landoj. Bedaŭrinde ofte tiu helpo ne sukcesas, ĉar ĝi estas direktata al komunumoj, kiuj fakte ne sentas la neceson evolui. François Choffat kaj Jean Lasserre, dum sia vizitado al la kimbanguanoj konstatis, ke tiu kolektiveco ĝis nun vivis en grandega izoliteco. Ĝi estas religia movado, pro tio la ŝtataj helpoj ne direktas sin al ĝi. Sed la misioj evitas ankaŭ ĝin helpi. Ili ne ankoraŭ pardonis ĝian ekziston.

Cl.- Bela kristana pardonemo, ĉu ne ? Tamen la kimbanguanoj, kiuj planadas sian agadon, estus tre agrablaj kunlaborantoj por la funkciuloj de la teknika helpado. Ili nepre devas troviĝi sur la listoj de tiuj, kiujn devas kontakti la internaciaj help-organizaĵoj.

A.- Vi aŭdis Radio-Svislandon.

Cl.- Claude kaj Andrée Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !